# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ◆ lokakuu ◆ oktobro ◆ 5/2011




*Salutojn el la somera karavano al la UK en Kopenhago. Jen la grupo ĉe nia aŭtobuso: dum reenvojaĝo ni haltis en la eta urbo Hjo ĉe la lago Vättern. Fotis nia ŝoforo Timo Launokorpi.*

## Vintraj Tagoj en Riihimäki: studu kaj ludu per modernaj iloj, p. 12

**Raportoj de Tornio al Torino, p. 4-9, 16-18 ◆ Malfermaj pordoj, p. 14**

# Esperantolehti

## Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.
Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo**: 💻 eafgazeto@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori. 💻 robog@gmx.de
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*
Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 044 3933 924 💻 ilkka.santtila@welho.com
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

**Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 22 e/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ 044 2642 742 💻 eaf@esperanto.fi
**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
**Pankkitili/Bankkonto:** FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Sampo 800017-230825).

**Julkaisija/Utgivare/Eldonanto:** Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 330

## Esperanto-Asocio de Finnlando ◆ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 💻 eafprezidanto@esperanto.fi
**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 💻 paivi.saarinen@iki.fi
**Sekretario/Sihteeri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 💻 eafsekretario@esperanto.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**
*Paula Niinikorpi*, Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 💻 paula.niinikorpi@gmail.com
*Jukka Nikoskelainen*, Pohjolankatu 11, 20100 Turku. ☎ 050 525 3745 💻 juknik@utu.fi
*Markus Sunela*, Kalevan puistotie 16 B 23, 33500 Tampere. ☎ 040 768 5165 💻 markus.sunela@iki.fi
*Keith (Keke) Uber*, Poutapolku 3 B 30, 02110 Espoo. ☎ 040 413 4252 💻 keith_uber@yahoo.com

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**
*Robert Bogenschneider*, Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori. 💻 robog@gmx.de
*Börje Eriksson*, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 💻 esperarto@phnet.fi
*Tiina Kosunen*, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 💻 eafkasisto@esperanto.fi

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 💻 eafkasisto@esperanto.fi
**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Sampo 800017-230825).

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**
FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (Sampo 800020-5995369) (UEA/EAF Päivi Saarinen)
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Oficejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.
☎ 044 2642 742 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Internet**: http://www.esperanto.fi

# Jaro de krizoj



Dum tiu ĉi jaro ni ĉiloke traktis seriozajn aferojn. Kio okazas en Finnlando kaj en la mondo trudas temojn ofte ne gajajn. La tertrema kaj cunama katastrofo en Japanio forte tuŝis nin. Multaj el ni havas amikojn en Japanio. Laŭinforme neniu membro de Japanaj esperanto-organizaĵoj pereis en la katastrofo, sed des pli ĝi influas la vivon de ĉiuj – ne nur en Japanio, sed tutmonde kaj ne nur jarojn, sed konstante, tutestonte. La bone organizita, demokratie gvidata socio energie entreprenas rekonstruadon en Japanio. Raportoj el insulo kontraŭflanke de la terglobo estas malpli kuraĝigaj: Post la katastrofa tertremo en Haitio jaron antaŭ tiu en Japanio rekonstruado laŭ raportoj tre malrapide progresas, kaj la plej malriĉaj plej suferas, daŭras senhejmeco kaj mizero. La ŝtato ekzistas kaj estas principe demokratia, sed ĝi suferas pro strukturoj disaj kaj misaj post longaj periodoj de aŭtokrateco kaj korupteco.

En arabaj landoj registaroj falis unu post la alia dum la jaro. Tre kompreneble, ni ĝojas pro tio. Plejmultaj ŝtatoj sude de Mediteraneo ne povas fanfaroni pri politika demokratio aŭ eĉ ekonomia sukceso, almenaŭ ne pri justa divido de tia sukceso inter siaj loĝantoj kaj laborantoj (ne ĉiuj estas civitanoj, landoj ne rekonas ĉiujn laborulojn siaj filoj). Ankaŭ ni ne povas fanfaroni pri nia rolo: Dum jardekoj Finnlandaj firmaoj kaj iliaj Finnlandaj dungitoj profitis el projektoj, plejparte konstruadaj, en ekzemple Egiptio, Saŭd-Arabio kaj Libio. Ĉi-lasta suferas de monatoj pro senkompata civila milito. La diktatoreca ŝtatestro evidentiĝis malfacile renversebla fare de neunueca opozicio. Ambaŭ partioj de la civila milito uzas armilojn produktitajn kaj venditajn de la libera, progresinta mondo…

En nia libera kaj progresinta Eŭropo oni disputas, kiu kulpas pro kaj kian solvon trovi al la financa krizo, kiu minacas la funkcipovon de la banka sistemo kaj la komuna valuto eŭro. La Eŭropa Unio staras antaŭ la plej granda defio dum sia ekzisto. La progresinta Eŭropo faris al si regulojn kaj malobeis ilin. Rezultas financaj krizoj en pli kaj pli da landoj, kies financa ekonomio evidentiĝas misrilata kun la vera ekonomio produktanta kaj aktivanta. Veziko kreskas, ĝis ĝi eksplodas. – Kaj tiam oni ekserĉas kulpantojn, aperas tendencoj kaj movadoj ekstremismaj.

Iuj esperantistoj produktis reklamilojn kun la teksto "Eŭropo havas komunan valuton, la eŭron; do ĝi havu komunan lingvon, Esperanton". La nuna sociekonomia klimato ne favoras tian sloganon nun, kiam la komunvaluta sistemo travivas profundan krizon. Indas demandi, ĉu sloganoj ligitaj al ekonomiaj interesoj entute servas al nia afero. Eĉ pli: Ĉu Zamenhof pravis rifuzante "komunecon kun tia Esperanto, kiu servas nur al komerco"?

*Tuomo Grundström*

# Baltiaj Esperanto-tagoj (BET-47)

La 47-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-47) okazis la 9-an ĝis 16-an de julio 2011 en Latvio en Malpils. Prezidantino de la Organiza komitato de BET-47 estis Margarita Želve kaj vicprezidantino Biruta Rozenfelde. La vilaĝo Malpils situas en sudorienta parto de Riga distrikto. BET-ejo funkciis en la Profesia mezlernejo de Malpils. La vilaĝo Malpils pruviĝis esti vere ĉarma urbeto, en formo de vilaĝo aranĝita en granda parko kun lagetoj kaj riveretoj.

Mia edzino Eeva, ankaŭ esperantisto, partoprenis en la kongreso. Ni havis rektan flugon Turku-Rigo kiu daŭris 1½ horojn. Malpils estis facile kaj komforte atingebla de la Riga bushaveno per buso Rigo–Malpils, per distanco de 60 km. De la bushaltejo de Malpils estis rekta vojo, proksimume 10 minutojn perpiede, ĝis la BET-ejo, profesia mezlernejo (latve – Mālpils Profesionālā vidusskola) tra la parko de Malpils.

Estis 68 partoprenantoj en la kongreso. Plejparto de ili estis el Latvio kaj Litovio. Sed ankaŭ estis kelkaj partoprenantoj el aliaj landoj, el Portugalio 1, el Rumanio 1, el Rusia federacio 2, el Germanio 2, el Belgio 1 kaj el Sud-Afriko 1. El Finnlando estis 6 partoprenantoj kaj el Estonio 6.

Partoprenantoj de BET-47 loĝis en la malmultekosta studenta hotelo de la lernejo aŭ en hotelo "Mālpils muiža", ankaŭ nomita palaco de Malpils. La bieno Malpils estis konstruita en 1760, sed renovigita post la bruligo en 1905. Hodiaŭ la konstruaĵo estas tre bele renovigita altkvalita hotelo. Ni faris ankaŭ ekskurson al palaco kadre de la kongreso kaj aŭskultis legendojn pri baronoj kaj baroninoj kaj pri iliaj




*Partoprenantoj de BET-47.*

amaferoj en historiaj tempoj. Ĉi-tiu bela hotelo estas hodiaŭ tre populara loko por aranĝi geedziĝfestojn.

Preskaŭ ĉiuj programeroj okazis en la Profesia mezlernejo de Mālpils. La unua programero – la Interkona Vespero komenciĝis la 9-an de julio. La Solena Malfermo okazis dimanĉe la 10-an de julio. Samtage estis ankaŭ Esperanta Diservo en la luterana preĝejo de Mālpils. Ekde lundo ĉiutage okazis diversnivelaj Esperanto-kursoj kaj kurso de latva lingvo, funkciis Somera Universitato, estis organizitaj kvizo, aŭkcio, vespere – koncertoj de folkloraj ensembloj de Mālpils, folklora grupo "Muzikistoj de Maskaĉka" el Rigo, konata esperanto-kantistino Austra Pumpure kaj ŝia ensemblo "Animo". Fermo de BET-47 okazis la 16-an de julio.

Merkrede la 13-an de julio estis organizata tuttaga ekskurso al apudaj urbetoj Sigulda, Turaida kaj Āraiši. Sigulda situas en tiel nomata "Svislando de Vidzeme" – pitoreska ĉirkaŭaĵo de antikva valo de la rivero Gauja. Tio estas unu el la plej belaj kaj popularaj turismaj lokoj en Baltio. Dum la ekskurso ni vidis ruinojn de la Sigulda kastelo, la plej grandan, malnovan kaj vizititan kavernon en Latvio – kavernon Gutmana, kun kiu estas ligita romantika legendo pri la Rozo de Turaida kaj ŝia tragika amo. En Turaida partoprenantoj de tuttaga ekskurso vizitis Muzeon-naturparkon, kastelon de reĝo Kaupo kaj tombon de la Turaida Rozo. En Āraiši ni vizitis fortikigitan vilaĝon de antikvaj latvoj el la IXa ĝis Xa j.c., situantan sur laga insulo – unikan arkeologian monumenton de Latvio.

Dum BET estis organizitaj ankaŭ perpiedaj ekskursoj en Mālpils kaj ĉirkaŭaĵo.

La 47-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, mia unua BET, estis agrabla kaj interesa sperto kaj tre bone organizita. Mi konatiĝis kun afablaj kaj simpatiaj Baltaj gesamideanoj kaj ankaŭ kun esperantistoj el aliaj Eŭropaj landoj. Estis vere interese babili kun tiuj novaj konatuloj. Mi admiras la baltajn esperantistojn el kiuj multaj havis malagrablajn spertojn el la sovjeta okupada erao. Tamen ili ne ŝajnis amaraj, kion mi multe admiris. Badaŭrinde la BET okazis je tiel proksima tempo al la Kopenhaga UK, ke multaj Esperantistoj ne povis partopreni en ambaŭ kongresoj kaj devis decidi kiun kongreson elekti.

*Jukka Nikoskelainen*

## Por Kristnaskaj donacoj
## Joululahjavinkkejä

Al esperantista amiko:

**Sep Fratoj** – 20 e + sendokostoj 4e

Al ajna amiko:

**Jarabono de La Ondo de Esperanto** 38 e

Al amiko ankoraŭ ne esperanta / suomenkieliselle ystävälle:

**Tohtori Zamenhof ja kansainvälinen kieli** 15 e inkl. sendokostojn

*Mendu ĉe EAF – Tilaukset Esperantoliitosta, vidu/ks. p.2.sivulta*

## Eventokalendaro de EAF

**2011**

17.12. Malfermaj pordoj en la oficejo de EAF kaj Solstica festo de FEJO

**2012**

10.–11.3. Vintraj Tagoj de EAF en Riihimäki

8.–9.6. Antaŭekskurso de kursosemajno (Naantali, Turku)

10.–15.6. Esperantokurso en Popola instituto de Valamo

28.7.–4.8. UK en Hanojo, Vjetnamio

# Vojaĝo al Finnlando kaj Rusio

Mi vojaĝis en Finnlando kaj Rusio de la 8a de junio ĝis la 30a de junio 2011. En Finnlando mi partoprenis Esperantokurson en Valamo. Antaŭ la vojaĝo mi per retleteroj kontaktis kun tieaj esperantistoj en Finnlando kaj Rusio.

La 8an de junio mi alvenis al la flughaveno de Helsinko. Je la 15:55 mi ekveturis al Turku per buso. Post 3 horoj, kiam mi alvenis en la urbo Turku, s-ro Bruno, s-ino Tiina kaj s-ino Merja atendis min en la bushaltejo. Mi estis tre ĝoja pro tio, ke ili gvidis min al la domo de Bruno. Ni vespermanĝis kune en la domo.

Dum kvar noktoj de mia restado en la domo de Bruno, mi vizitis la urbon Tampere, kie s-ino Silvia gvidis min tie kaj ĉi tie. En Turku Tiina gvidis nin al la ekspozico de la fajrego. Ankaŭ ŝi gvidis nin al la Muminmondo en urbeto Naantali, kie mi amuziĝis kiel infano kun remburitaj pupoj. Bruno gvidis min al la urba biblioteko, muzeo, kastelo kaj ŝipa haltejo en Turku.

En la kursoloko Valamo mi pasigis bonegan tempon pro la interrilatoj kun la instruistoj s-ro Atilio, s-ino Tiina kaj aliaj partoprenantoj en la Esperantokurso. Ni parolis en Esperanto ne nur en la kurso sed ankaŭ en la manĝejo. Mi ŝatis la areon en Valamo, kiu situas oriente apud lagoj kun bela finna naturo. Pro tio ĉiumatene mi promenis proksime al la lago kaj mi sentis freŝan aeron kun bela pejzaĝo. Mi ĝuis la ekskursojn, kiuj estis veturo en ŝipo, promenado en arbaro kaj vizito al tombejo. Por mi aparte interesa estis vizito al saŭno. Mi surpriziĝis, pro ke post la saŭno, la finnaj virinoj, ankaŭ la esperantokursanoj, naĝis en la lago. La akvo de la lago estis nekredeble malvarma kaj mi ne povis trempi en ĝi eĉ miajn piedojn.

Post Valamo mi veturis al Helsinko per buso. En la restoracio kun Atilio, Tiina kaj du aliaj esperantistoj de Helsinko mi vespermanĝis gaje. Mi povis tranokti en la oficejo de Esperanto-Asocio de Finnlando pro la favoro de finnaj esperantistoj por vojaĝi al Rusio.

Sekvamatene en la 18-an de junio mi veturis al Sankt-Peterburgo per trajno. Poste mi ekvojaĝis al Moskvo en la 24-a de junio per nokta trajno kaj alvenis tien en la sekvanta mateno. La 30-an de junio mi revenis hejmen.

Mi renkontis multajn esperantistojn dum mia vojaĝo en Finnlando kaj Rusio. Dank' al Esperanto mi povis ricevi bonegajn spertojn.

Mian restadon en Finnlando mi agrable povis pasigi dank' al la bonaranĝo de Tiina. La unuan



***Ĵunko kun Tiina kaj Aila dum ŝipekskurso.***
*(Fotis Anja Astokari)*

# SES (Somera Esperanto-Studado)

## *2011, Nitra, Slovakio*

Inter 29.07. kaj 07.08. mi havis plezuron partopreni SES 2011 en Nitra, Slovakio. SES estas lernada renkontiĝo organizata de E@I, organizo, kiu kreis la retpaĝaron lernu.net. Kompreneble la plej grava programero estis instruado. Estis ses grupoj dum la SES, kvin por studi lingvon. La sesa estis por Esperantistoj kiuj volas lerni instruadon. Ni havis klasojn matene, inter maten- kaj tagmanĝo. Krom tio, ni ankaŭ havis aliajn interesajn aktivaĵojn – ĉiutage posttagmeze oni povis partopreni en variaj kursoj kaj kursetoj, ĉiu tago havis sian ĉeftemon. Tiumaniere ni povis lerni iomete pri lingvoj, ekzemple slovaka aŭ ĉina, sed ankaŭ pri Toki Pona kaj Slovio, aŭskulti pri la Esperantomovado aŭ lerni fari nodojn. Ĉiun tagon finis koncerto. Ni ĝuis slovakan popolan muzikon de familia grupo “Rodina Hlbocká”, junajn polinojn de “Vento de montaro”, “La perdita generacio”, “Asorti” kaj koncerton de Juliano kaj Johannes. Dum semajno ni ankaŭ povis partopreni en gviditaj ekskursoj al la urbo Nitra, Monto Zobor kaj tuttaga ekskurso al Topol’čanky aŭ Bratislava.



Malbanala programo, ĉarma loko kaj plej grave – sinceraj, toleremaj, ridemaj homoj kreis neforgeseblan bonegan etoson.

SES estis mia unua Esperanto-renkontiĝo, do fakte la tuta Esperanto-movado kaj ĝia etoso estis novaĵo por mi. Mi ege ĝojas, ke mi povis partopreni en SES kaj mi volas esprimi dankon al la Fondumo Esperanto por subteni mian vojaĝon.

*Michał Matusewicz*

*(Foto: Peter Baláž)*

---

fojon mi partoprenis en la Esperanto-kurso en Valamo kaj mi estis kontenta pro bonaj aranĝoj kun bela naturo. Fine mi dankas al la finnaj Esperantistoj pro la afabla akcepto por mi dum mia restado.

*Ĵunko OSHIMA*
*kursano en Valamo 2011*

# Suna, varma renkontiĝo en Torino

La 78a Itala kongreso de Esperanto okazis en Torino nur tri semajnojn post la UK en Kopenhago. Partoprenintoj estis 270 el 30 landoj, duono el ili estis eksterlandanoj de Brazilo ĝis Indonezio kaj ekde 3+ jaraj ĝis 80+.

En bona, amika etoso okazis multaj interesaj renkontoj kaj diskutoj inter kongresanoj.

La programo multe similis en tiuj du kongresoj: samaj kaj prelegintoj kaj artistoj; same malfacile estis elekti inter samtempaj programeroj. Evidentiĝis ke la ĉefa ideo estis jena: se vi deziras plibonigi vian lingvoscion, vi partoprenu al lingvajn kursojn (progresiga aŭ perfektiga), se vi la lingvon jam bone regas, elektu seminariojn, prelegojn. Eblis ankaŭ ekzameniĝi laŭ la KER-sistemo (KER = Komuna Eŭropa Referenckadro) aŭ laŭ la nacia itala ekzameno.

La kongresa temo estis ”…kaj nun ni estu eŭropanoj”. La Eŭropa Komisiono subtenis la ĉefan seminarion tiel ke eksterlandaj partoprenintoj ricevis subvencion por la kostoj de la tuta semajno. Dudeko el ni sin anoncis kiel ano de seminario A. Gvidanto estis Bertrand Hugon, temoj kiel historio de Eŭropa Unio, koncizega historio de demokratio, pri kultura kaj lingva diverseco.

Dua seminario B nomiĝis ”Esperanta dramarto – la unua jarcento” sub gvido de Paul Gubbins. En la fino de la semajno okazis publika resumo de ambaŭ seminarioj.

Interese estis sekvi aliajn prelegojn pri diversaj temoj i.a. ”Enkonduko al Esperanto” (Anna Löwenstein), ”Esperanto en la abiturienta ekzameno en Hungarujo” (Marta Kovacs), kaj en



*Movada foiro en la urbocentro, ĉe la rivero Pado (Po). En proksima preĝejo okazis esperantlingva Katolika Diservo.*

la lasta tago prelegis Katalin Kovats tre kortuŝe kaj emocie pri Tiberiu Morariu. Fine ni rigardis la filmon ”Japana printempo” de Roman Dobrzinsky, kiu ricevis la ĉijaran unuan premion en UK.

Tamen plej strange, sed ege interese estis ĉeesti prelegojn unu horon antaŭ la meznokto, kiam deko da aŭskultantoj kolektiĝis kiel ”popolo de intelektaj idealistoj”. Gvidis Davide Astori, konata ankaŭ kiel ĉijara premiito pri eseo en la Belartaj konkursoj en Kopenhago. Temis pri Zamenhof kiel profeto de Eŭropo. Malgraŭ nokto aperis vigla diskutado pri ideoj de Zamenhof kompare kun samtempaj kaj pli fruaj filozofoj en Eŭropo, ideoj kiel unu lingvo, unu religio kaj la unio de eŭropaj landoj. Mi kiel laiko en filozofiaj demandoj lernis denove la fakton, ke ne povas ekzisti estonteco sen konscio pri la propra historio.

Kompreneble eblis ankaŭ ekskursi: egipta muzeo, historia Torino, kun reĝaj palacoj, placoj, riĉe ornamitaj preĝejoj, muzeo de la Sankta Tuko de Torino, mezepoka urbo kaj fortikaĵo (kiu naskiĝis kiel ekspozicia paviliono en la 1880-aj jaroj kaj restis), botanika ĝardeno kaj tuttaga ekskurso al Stresa kaj Lago Maggiore. Ŝipe ni vizitis tri insulojn kun pitoreska pejzaĝo, insuloj kiuj laŭ gvidlibro aspektas kiel ŝipoj flosantaj surlage.

Ekde la unua tago ĝis la fino en nokta, daŭre tre varma malhelo je 21.30–23.00 ni ĝuis pri multflanka muziko: esperanta kataluna grupo “Kaj Tiel Plu”, Martin Wiese el Svedujo, Manuel Rovere el Italujo, la grupo Asorti el Litovujo, la itala grupo Reverie kaj Kajto, duo el Frislando, Nederlando. Dum la internacia arta vespero eĉ plian ekzotikon donis ĉina kanto pri Rozo kaj ankaŭ kantado de Probal Dasgupta.

Por noktemuloj estis ne nur filozofiaj prelegoj sed ankaŭ Intelektaj ludoj kaj gejunuloj ĝuis noktan programon ĝis la 5.00 matene. Mi jam tiam dormis, feliĉe en mia ĉambro malhejtigilo funkciis!

Plejparto de kongresanoj loĝis en la kongresejo, Villa Gualino, kie ni ankaŭ trifoje tage bone manĝis kaj ĝuis pri tipe itala kuirarto. La kongresejo situis supre en la monto, la vojo estis tre kruta kaj serpenta. Belege estis rigardi al la urbo kaj al la Alpoj, kiuj nur en la lasta mateno plej klare estis videblaj.

Por fini tiun raporton: kiam vi planas vian venontsomerajn vojaĝojn, pensu pri la itala kongreso en Sicilujo. Mazaradelvalo estas antikva urbo ĉe la maro en la sudokcidento de la insulo (18.–25.8.2012). La temo estas: “Sed homoj kun homoj: la pluretna intuicio de Zamenhof” – same tre aktuala kiel estis la ĉijara temo. En la paĝaro: *http://kongreso.esperanto.it/79* vi trovos jam nun informojn kaj retan aliĝilon.

*Sirkka Mattlin*
*unu el tri finninoj en Torino*

## Fabelkonkurso 2011

Saluton el la Instituto de Päätalo en Taivalkoski! En la tago de Satu (= Fabelo) la 18-an de oktobro 2011 okazis la premiofesto de la finnlingva fabelkonkurso “Napero Finlandia” (napero = infano) en la hotelo Herkko en Taivalkoski. La plej bonan fabelon, kiu gajnis la premion Napero Finlandia, verkis Vilja Vuorinen el Laitila. Ŝi estas lernantino en la lernejo kie laboras Tuomo “Tomaso” Grundström. Gratulojn al Vilja kaj al la tuta lernejo!

La premio Fabelo Internacia estos sendota al Kubo, al la grupo Amiketoj de Kolibrido, kiu sendis la nuran esperantlingvan fabelon al la ĉijara fabelkonkurso. La verkintoj nomiĝas Susana Valdis Vagaz, Marcos Antonio Alzugaray Martinez, Laura Habel Mauno Mina, Juan Carlos Triana Alfonso, Beatsy Aguilas Ensiquez kaj Jaime Alberto Paez Honan. La nomo de la fabelo estas “La rapida ĉevalido”. Dankon kaj gratulojn al la infanoj kaj al la instruisto Jose de J. Campos Pacheco!

*Aini Vääräniemi*

## 100 000 EUR por ESF!

Por festi la registriĝon de la 100 000-a uzanto de *lernu.net*, la lernu!-teamo kunlabore kun E@I lanĉis donackampanjon por subteni Esperantic Studies Foundation (Fondaĵo por Esperantismaj Studoj, ESF). La celo estas kolekti 100 000 eŭrojn por ESF antaŭ la 15a de decembro 2012.

”Sen ESF Esperantujo ofertus malpli da servoj al esperantistoj kaj al tiuj, kiuj volas lerni Esperanton.” Tiel klarigas la lernu!/E@I-teamo sian deziron helpi al ESF daŭrigi sian bonan laboron en la artikolo ”Kio estas ESF, kaj kial ĝi subtenindas?”, kiu aperis en la oktobra numero de ”La Ondo de Esperanto”. “Tio estas tre ambicia tasko”, agnoskas la teamo, “sed ĝi povas esti realigita, se multaj Esperantistoj subtenos tiun iniciaton”. Speciale por tiu ĉi kampanjo la teamo funkciigis retpaĝon *http://kampanjo.ikso.net*

Fondita en 1968, ESF fariĝis unu el la plej grandaj investantoj en la modernan Esperanto-komunumon, kaj eĉ se relative malmultaj aŭdis pri la fondaĵo mem, esperantistoj ĉie en la mondo povas ĝui la fruktojn de ĝia laboro. Multaj grandaj kaj konataj projektoj ricevis financan helpon de ESF, inkluzive de retpaĝoj por antaŭenigi studadon de Esperanto (*lernu.net* kaj *edukado.net*), programoj pri instruado de Esperanto en lernejoj (‘Springboard to Languages’ [‘Lingvosaltilo’] en Britio) kaj trejnado de Esperanto-instruistoj (Renato Corsetti ricevis stipendion por trejni instruistojn en Afriko). La instru-filmo ’Esperanto – Pasporto al la Tuta Mondo’ kaj la inform-filmo ’Esperanto estas’ kreiĝis danke al ESF-subvencio. La fondaĵo helpis eĉ al ne-esperantistoj: ekzemple, la reĝisoro Sam Green ricevis subtenon por sia dokument-filmo pri Esperanto. Pluraj helpiloj por tiuj kiuj jam parolas Esperanton estis kreitaj danke al ESF-subvencioj, inkluzive la retan korpuson *tekstaro.com*, per kiu oni povas trovi la historian uzon de iu vorto. ESF ankaŭ apogis konservadon de Esperanto-historio, interalie, per financado de la plurjara laboro de UEA por konservi la enhavon de la Biblioteko Hodler. Tiuj estas nur kelkaj el la amaso de projektoj kiujn ESF subtenis dum ĝia pli ol 40-jara ekzisto.

La teamo de *lernu.net* decidis lanĉi la donackampanjon por ESF pro la grava rolo de ESF en la kreo kaj subteno de *lernu.net*. ”Danke al la apogo de ESF, *lernu.net* kreskis al komunumo de pli ol 103 000 uzantoj, kaj ekzistas en 37 lingvoj”, klarigas la teamo. Kvankam la moderna Esperanto-movado estas grandparte centrita en Eŭropo, lernu havas multajn milojn da uzantoj ekster Eŭropo: pli ol 2600 en Afriko, pli ol 3000 en Oceanio, pli ol 11.500 en Azio, kaj pli ol 35 000 en Ameriko. Preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo estas reprezentitaj en la lernu!-uzantaro. Estas lernu!-uzantoj en Birmo, Afganujo kaj Reunio; estas lernu!-uzantoj en Turkmenujo, en la Palestinaj Teritorioj kaj en Bocvano. Multaj el tiuj lernantoj ne havas instruistojn pri Esperanto, sed pere de la Interreto lernu! portas senpagajn Esperanto-kursojn al iliaj hejmoj.

Multaj konataj esperantistoj jam esprimis sian subtenon al la donackampanjo. Mark Fettes, vic-prezidanto de ESF kaj iama estrarano de UEA, rimarkis: “Kun la reta epoko, nia mondo malkreskis, kaj multege kreskis la eblecoj rapide komuniki, decidi kaj agi. Iom post iom nia tuta movado devos adaptiĝi al tio, sed ESF jam montras la vojon, subtenante promesplenajn iniciatojn sur la kampoj de edukado, scienco kaj teknologio. Se vi donacos al ESF, vi povos esti certa, ke via mono uziĝos por konkretaj projektoj, bone mastrumataj, kiuj altigos la prestiĝon, videblecon, kaj uzindecon de Esperanto en epoko de tutmondiĝo.”

Legu artikolon pri la kampanjo kaj pri ESF ĉi tie: *http://blogo.ikso.net/2011/09/kio-estas-esf-kaj-kial-gi-subtenindas/*

Pri la planoj de ESF plivastigi lernu.net: *http://esperantic.org/eo/komunikado/novajxoj?n=57*

*[ESF]*

# Esperanto-insulo volas konstrui ponton inter kontinentoj

Sude de Ĉinio, tre proksime de Vjetnamio, en la klimate tre agrabla suda insulo Hainan (la ”Havajo de Ĉinio”) prepariĝas evento, kiu certe ne restos senspura en la historio de la Internacia Lingvo: ”Esperanto-Insulo”.

Temas pri tre intensiva lernado kaj praktikado de Esperanto dum 8 horoj ĉiutage, kaj tio dum unu monato – de la 11a de januaro ĝis la 12a de februaro 2012. Povas partopreni ankaŭ komencantoj kaj nefluaj parolantoj de Esperanto. Okazos unu tre tre intensa kurso, du instruistaj kaj tri universitataj. Detaloj aperas ĉe *http://www.esperanto-insulo.info/kurso-specoj.htm*.

En la pli kaj pli internacia listo de partoprenontoj de tiu bone envojigita projekto inkluzive la kursgvidantoj aperas ĝis nun 57 nomoj (+ 3 koreanoj partotempe) el Ĉinio, Barato, Portugalio, Usono, Italio, Aŭstralio, Taĝikio, Koreio, Hungario, Francio, Litovio, Hispanio, Rusio, Danio, Tajvano.

Sekve, Esperanto havas nature sian lokon en insulo, kiu laŭ informo de Ĉina Radio Internacia “sin dediĉas por esti internacia turisma insulo”.

Aŭtoro de “Confronting War”, Ronald Glossop (Usono) gvidos kurson pri milito kaj paco sub la titolo “Alfronti militon”.

Katalin Kovats (Hungario/Nederlando) de *Edukado.net*, unu el la plej kompetentaj, talentaj kaj ŝatataj figuroj sur la tereno de Esperanto-instruado, pritraktos metodikon de la Esperanto-instruado por personoj, kiuj volas akiri profesinivelan kapablon en Esperanto-instruado.

Dennis Keefe (Usono/Francio/Ĉinio), iniciatinto kaj ĉefa gvidanto de la projekto, ebligos provi viajn novajn teknikojn kaj metodojn lernitajn de Katalin kun la metodo BEKkurso (*www.bekkurso.info*), kiun li mem inventis.

Federico Gobbo (Italio) pritraktos la temon ”Filozofio kaj historio de la informadiko”.

Pliaj proponoj pri alitemaj universitataj kursoj estos bonvenaj. La universitataj kursoj estos filmitaj por iĝi parto de la projekto Virtuala Universitato de Esperanto, kiu estos poste ĉies propraĵo laŭ la principoj de Kreiva Komunumo.



Interesatoj pri tiu internacia diversnivela kursaro de Esperanto povas turni sin al Dennis Keefe (*keefeinchina@gmail.com*) en la angla, franca kaj hispana, se ilia scipovo de Esperanto estas nesufiĉa.

Eblas ankaŭ finance subteni la iniciaton per ĝiro al la konto de UEA ”eins-t” **kun mencio ”por Esperanto-insulo”.

Tio estas des pli bonvena, ke ĝi okazos komence de la jaro 2012, cent jarojn post kiam Ĉinie en 1912 unuafoje en la mondo Caj Yuanpei (ministro de edukado, granda edukisto, pioniro pri egaleco inter viroj kaj virinoj) dekretis enkondukon de Esperanto en porinstruistaj lernejoj. Cent jarojn poste, ankaŭ en Ĉinio, prepariĝas projekto, kiu sekvas la modelon de Caj Yuanpei: klerigi instruistojn por instruado de Esperanto, tamen ĉifoje por dissendi ilin ne nur tra tuta Ĉinio, sed tra la tuta mondo. Ni povas konstati, ke li pravis, ĉar sen li Esperanto ne estus povinta havi la konsideron, kiun ĝi havas nun en Ĉinio.

*laŭ Henri Masson (ipernity.com/home/32119)*
*[esper-inform]*

# Vintraj Tagoj – Talvipäivät

## 10.–11.3.2012

Kunvenejo: Hotelo Seurahuone en Riihimäki. Adreso: Hämeenkatu 29, 11100 Riihimäki

Temo: Edukado kaj instruado en formo de metiejoj – aihe: Opetusta ja valistusta, työpajat odottavat

Vintraj tagoj okazos venontprintempe en la urbo Riihimäki proksime al Helsinki. La temo de la tagoj estos *Edukado kaj instruado* kaj ni celas ĉi-foje montri al vi eblecojn studi en la reto. Se vi ne ankoraŭ vizitis en *lernu.net* aŭ *edukado.net*, nun vi havus eblecon. Prenu vian propran komputilon aŭ uzu tiujn kiujn ni kunportos.

Krom propraj provoj, vi aŭdos pli pri eblecoj kiel lerni tra la reto. Eblos pli profunda kaj konkreta konatiĝo en RITE (vidu Esperantolehti 3/2011 paĝo 7).

La vespera programo enhavos viziton al la Esperantolando en programejo Dua Vivo (angle Second Life). Ĉu vi jam konas ĝin? Temas pri virtuala mondo, kie vi aperas kiel avataro. Se ni estos bonŝancaj, ni renkontos multajn esperantistojn kun kiuj eblas babili. Povos esti ke aranĝeblos eĉ prelegeto.

Kompreneble ni havos la tradiciajn programerojn de Vintraj tagoj: Jarkunvenon kun gravaj decidoj, akcepton por membroj de Societo Nino Runeberg, kunvenojn de membroasocioj kaj muzean viziton. Nia membroasocio ELFI (Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj) sin prezentas, ĝi atingis la respektan aĝon de 90 jaroj. Aperos historio de ELFI por la VT.

La muzea vizito dimanĉe estos al la vitromuzeo de Riihimäki, kie ni havos ĉiceronitan rondiradon. En la apuda restoracio okazos la dimanĉa tagmanĝo.

Ensi vuoden talvipäivät järjestetään Riihimäellä, hyvien kulkuyhteyksen varrella. Päivien aiheena on esperanton opetus sen eri muodoissa ja tarkoituksena on erityisesti tutustua verkkomaailman tarjoamiin mahdollisuuksiin. Joko tunnet *lernu.net* -ohjelman, entä *edukado.net*in ja siellä olevan opettajien valmennusohjelman nimeltään RITE (siitä kerrottiin Esperantolehden numerossa 3/2011)? Jollet, Riihimäen päivillä saat rautaisannoksen niiden käytöstä. Voit ottaa mukaan oman kannettavan tietokoneesi ja mokkulasi.

Iltaohjelmassa on käynti virtuaalimaailmassa nimeltä Dua Vivo (englanniksi Second Life). Siellä osallistujat ovat avatar-hahmoja. Hyvällä tuurilla tapaamme useita esperantisteja Esperantomaailmassa ja voimme vaihtaa kuulumisia. Saatamme ehkä kuulla lyhyen luennonkin.

Tietenkin talvipäivillä ovat perinteiset ohjelmat: vuosikokous tärkeine päätöksineen, Nino Runeberg -seuran vastaanotto, jäsenjärjestöjen kokoukset ja museokäynti. Jäsenjärjestömme ELFI (Suomen opettajien esperantoyhdistys ry) esittäytyy päivillä, se on saavuttanut 90 vuoden kunnioitettavan iän. ELFIn historiikki ilmestyy päivillä.

Museokäynti sunnuntaina suuntautuu Riihimäen lasimuseoon, jossa on opastettu kierros. Lounaan kahveineen nautimme museon kahvila-ravintolassa.





## Ĉu vi estas la sekva esperantlingva Kaurismäki? Sinustako esperanto-maailman Kaurismäki?

Por vi, kiuj estas artemaj, aliĝu la filmmetiejon. En malgrandaj grupoj ni rapide skribos, filmos, postredaktos kaj finfine prezentos tre mallongajn filmojn – elektu kaj kunportu vian propran temon! La filmoj estos kanditatoj en la sekva esperanta kinofestivalo: vidu *http://kinofestivalo.org/*

Riihimäen talvipäivillä on myös filmityöpaja. Se on erityisesti suunnattu sinulle, joka olet aina halunnut tehdä oman elokuvan. Teemme käsikirjoituksen, näyttelemme ja kuvaamme, leikkaamme ja sitten esitämme lyhyet videoklipit päivien muulle yleisölle. Valitse teemasi ja tule mukaan! Filmit pääsevät osallistumaan seuraaville esperanton elokuvajuhlille, ks. tarkemmin osoitteesta *http://kinofestivalo.org/*

## Aliĝu jam nun – Ilmoittautuminen

Detala programo aperos en sekva EF, sed vi povas aliĝi jam nun. Pliaj scioj vi povas demandi de la estraranoj de EAF, vidu kontaktinformojn sur paĝo 2.

Talvipäivien tarkempi ohjelma ilmestyy Esperantolehden joulukuun numerossa, mutta voit ilmoittautua heti! Lisätietoja saat liiton hallituksen jäseniltä, yhteystiedot sivulla 2.

*Bonvenon! Tervetuloa!*

ALIĜILO

Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF 10.–11.3.2012 en Riihimäki.

Nomo

______________________________________

Adreso

______________________________________

Tel./Fakso/Ret-adreso

______________________________________

**Aliĝkotizo**

___ 15 e ĝis 31.1.2012

___ 19 e ĝis 29.2.2012

___ 22 e poste

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo. Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

**VT-paketo**

___ 50 e/persono

(inkl. kafon kaj vespermanĝon sabate, lunĉon kun kafo dimanĉe kaj muzean viziton kun transportoj)

VT-hotelpaketo en hotelo Seurahuone Riihimäki

___ 40 e/persono en 2-lita ĉambro

___ 69 e/persono en 1-lita ĉambro

Entute pagenda al la konto de EAF _________

Pagoj al la konto: Sampo FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH.

Bv. uzi la VT-referencnumeron 4640 (ne skribu aliajn informojn, kiam vi ĝiras la monon).

Pliaj informoj aŭ deziroj al EAF:

______________________________________

Bonvolu sendi la aliĝilon al:
Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

Retaj aliĝoj tra *eafmendoj@esperanto.fi*

BONVENON!

ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton talvipäiville 10.–11.3.2012 Riihimäellä.

Nimi

______________________________________

Osoite

______________________________________

Puh./fax/sähköposti

______________________________________

**Ilmoittautumismaksu:**

___ 15 e 31.1.2012 asti

___ 19 e 29.2.2012 asti

___ 22 e 29.2.2012 jälkeen

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset. Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

**Talvipäivien paketti**

___ 50 e/hlö

(sis. kahvit ja päivällisen lauant., lounaan kahveineen sunn. sekä museokäynnin kuljetuksineen)

Talvipäivien hotellipaketti, hotelli Seurahuone Riihimäki

___ 40 e/hlö 2-hengen huoneessa

___ 69 e/hlö 1-hengen huoneessa

Maksut yhteensä Suomen Esperantoliiton tilille

__________

Tilinumero: Sampo FI11 8000 1700 2308 25.

Käytä viitenumeroa 4640 (ei muita tietoja viite- tai viestikenttään maksun yhteydessä).

Lisätietoja ja/tai toivomuksia

______________________________________

Lähetä lomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki
tai tiedot sähköpostitse *eafmendoj@esperanto.fi*

TERVETULOA!

# Malfermaj pordoj en la oficejo en Helsinki

*Sabate 17.12.2011 je 13a–16a horo, adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, urboparto Hakaniemi*

Bonvenon al jam tradicia decembra aranĝo en la oficejo: malfermaj pordoj okazos ĉi-jare la 17-an de decembro ek de la 13a. Ni havos ĉi-foje komputilajn programojn kun konatiĝo al diversaj retejoj kie Esperanto estas uzata. Tia estas ekzemple Dua Vivo (konata angle per la nomo Second Life), kie homoj aperas tra avataroj. Ni planas kontaktiĝi kun plej eble multaj esperantistoj pere de Skype-programo kaj havu iliajn rektajn salutojn al nia festeto.

Kiel jam en antaŭaj malfermaj aranĝoj la Asocio regalas vin per jultempaj dolĉaĵoj, kiuj ja estas la varma trinkaĵo ”glögi” kaj la spickuketoj ”piparkakut”. Tiel varmiĝos nia ĉeesto ankaŭ interne.

Bonvenon konatiĝi en la mirinda reta mondo en nia hejmeca oficejo. Kaj kompreneble je via dispono estos nia oficeja biblioteko kaj la libroservo. Kunprenu viajn geamikojn, ankaŭ tiujn kiuj ne ankoraŭ multe scias pri la internacia lingvo.

La vespero daŭrigos pere de Solstica festo de FEJO, vi estas tre bonvena partopreni ankaŭ en ĝi.

# Avoimet ovet Suomen Esperantoliiton toimistossa

*Helsingin Hakaniemessä, Siltasaarenkatu 15 C 65, sunnuntaina 17.12.2011 klo 13–16*

Tervetuloa liiton toimistoon avoimien ovien päivänä, josta on jo tullut joulukuinen perinne. Tapaat esperantonharrastajia ja ystäviä eri puolelta Suomea, ja tällä kertaa varmasti muualtakin. Olemme nimittäin virtuaalisesti yhteydessä

esperantisteihin eri puolilla maailmaa, apuna ovat mm. ohjelmat Skype ja Dua Vivo (Second Life) sekä tietenkin Facebook. Esittelemme ohjelmia, jotta niiden käyttö tulisi tutuksi. Ota mukaan myös asiasta kiinnostunut ystäväsi. Liiton hallitus tarjoaa glögiä ja pipareita ja tietenkin tarjolla on myös myyntiartikkeleita, erityisesti kirjoja.

Ilta jatkuu FEJOn järjestämällä Solstica festolla.

Esperantoförbundet i Finland håller lördagen den 17.12.2011 kl 13–16 öppet hus på sin byrå på Broholmsgatan 15 C 65, Helsingfors. Välkommen!

*Bonvenon!*
*Estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando*

★

# Esperanto-Societo en Turku 50-jara

*Bonvenon al la festo 15.12.*

Karaj geamikoj de EST!

La 50-jara festo de Turun Esperanto-yhdistys – Esperanto-Societo en Turku ry. okazos kiel anoncita, en ĵaŭdo, la 15-an de decembro 2011 en la restoracio de la hotelo Scandic Plaza Turku, kies adreso estas Yliopistonkatu 29. Ni komencos je la 18a kaj havos ĉirkaŭ 2½-horan kunestadon kun vespermanĝeto. En la programo estos muzikaj prezentadoj kaj humuraĵoj kaj kompreneble memoraĵoj de la pasintaj jardekoj, kiujn ĉefe rakontas nia estimata antaŭa prezidanto kaj ankaŭ nuna aktivulo Jorma Ahomäki.

Vi estas elkore bonvenaj sendepende de tio ĉu vi estas societa membro aŭ ne. La kotizo por partopreno estos 30 eŭroj, kiu inkluzivas la vespermanĝon kun bonveniga drinkaĵo. Bonvolu aliĝi al aŭ sekretario de EST Leena Tiusanen (tel. 050-5757956, *leena.tiusanen@elisanet.fi*) aŭ al prezidanto Tiina Oittinen (kontaktinformoj sur la antaŭlasta paĝo).

La partopreno al la festo aŭ saluto sendita tien estas por ni sufiĉaj gratuloj, apartaj aliaj donacoj ne necesas. Ĉar ni ne havas kunvenejon, konkretajn aĵojn estus malfacile akcepti.

Pliajn informojn, ekzemple kiel trovi la festejon, vi ricevos laŭbezone de Leena kaj Tiina.

*Kun festaj salutoj Estraro de EST*

## Tervetuloa juhlimaan 50-vuotiasta yhdistystämme

Hyvät Turun Esperanto-yhdistyksen ystävät!

Yhdistyksemme 50-vuotisjuhla järjestetään 15.12.2011 Scandic Hotel Turun ravintolassa, osoite Yliopistonkatu 29, klo 18.00 alkaen. Ohjelmassa on iltapalan lomassa noin 2½ tunnin ajan musiikkia, sketsejä ja tietenkin muistelmia kuluneilta vuosikymmeniltä Jorma Ahomäen ja muiden kertomina. Jormahan on yhdistyksemme entinen puheenjohtaja ja edelleen aktiivinen jäsen, joka juuri tänä vuonna sai Esperanton maailmanliiton tunnustuksen aktiivisuudestaan.

Sydämellisesti tervetuloa, olitpa sitten yhdistyksen nykyinen tai entinen jäsen tai sen toimintaa muulla tavoin kannattava esperantisti. Juhlan osallistumismaksu on 30 euroa ja siihen kuuluu iltapala ja tervetulomalja. Ilmoittautumiset joko sihteeri Leena Tiusaselle (tel. 050-5757956, *leena.tiusanen@elisanet.fi*) tai puheenjohtaja Tiina Oittiselle (yhteystiedot jäsenjärjestöt-sivulla). Heiltä saat myös tarvittaessa lisätietoja esimerkiksi juhlapaikan sijainnista.

*Juhlatunnelmaisin terveisin*
*EST:n hallitus*

★

# Aŭtunaj Tagoj en la fora nordo

La Aŭtunaj Tagoj 2011 okazis inter la 9a kaj 11a de septembro, kaj ĉifoje konsistis ĉefe el vojaĝo al la Nordo. Bazejo estis la urba hotelo en la duobla finn-sveda urbo Tornio/Haparanda, kun kiu ni konatiĝis per busa gvido kaj promeno laŭ la limrivero kaj vizito de preĝejo sur la sveda flanko.

Ĉefcelo de la Tagoj estis busa ekskurso al la sveda Pajala, kie ludas la filmo ”Populärmusik från Vittula”, kun sceno en Esperanto. La vojaĝo okazis laŭlonge de la Tornio-rivera valo, kun haltoj en Kattilakoski proksime de la Polusa cirklo (kie brila suno des pli beligis tiun turisman lokon), en Övertorneå por viziti preĝejon kaj ĉe la monteto Keisari [Imperiestro] kun ties raviga rondrigardo super la ĉirkaŭantan pejzaĝon Aavasaksa.

La loko rilatas al Lars Levi Laestadius, en kies muzeo ni ricevis plian gvidon. Laestadius estis vaste interesita kaj sperta pastoro en Pajala (kie li ankaŭ mortis), inter alie lernanto de la fama botanikisto Linné, kaj entreprenis ekskursojn en la proksimeco kaj pli foraj lokoj kiel Norvegio por esplori kaj katalogi plantojn. Tiel li iĝis spertulo pri arkta flaŭro, 4 plantoj ricevis nomon laŭ li. Samtempe, kiel parolanto de loka finna dialekto/lingvo “meänkieli” (“nia lingvo”) kaj ankaŭ samea lingvo, li disvastigis branĉon de luteranismo inter sameoj, kaj estas rigardata apostolo de sameoj.

Kun malpli ol 20 partoprenintoj la aranĝo ne estas rekorda, sed ja ebligis vidi lokojn ne ofte atingeblajn. Sunbrilo dum la plej belaj vidaĵoj alportis belajn memorojn al tiuj, kiuj aŭdacis kunveturi en noktaj trajnoj kaj busoj.

*RB*



*Esperantistoj en Pajala ĉe la muzeo de Laestadius – norda poliglot**o**.*

# Diskutrondo en Hyvinkää

2–5 esperantistoj el Hyvinkää kaj la ĉirkaŭaĵo jam dufoje kunvenis en la hejmo de Saliko merkrede vespere. Ni havis ankaŭ gastojn el Pori, Iittala, Svedio kaj Ĉinio. Ni provas lerni paroli Esperante kaj kompreni la paroladon unuj de la aliaj.

Ĉiu elpensas por la kunsido ion, kion ili rakontas vice. La aliaj helpas, se mankas vorto, kaj demandas pri detaloj.

Nin multe amuzis kaj lernigis la fantastaj magiaĵoj de Markku Sarastamo.

Bonvenon al nia rondo ankaŭ el ekster Hyvinkää. Tranoktado de du personoj eblas ĉe Saliko.

Ĉar povas okazi esceptoj, bonvolu kontaktiĝi, se vi deziras viziti la Diskutrondon.

*Raita Pyhälä*




***Saliko kaj sveda gasto Kerstin Rohdin.***



***Robert, Sirkka***



***Kroko***



En la rondo Markku Sarastamo faris “samovaron” (sam-ovo-aro, vortoludo).

La ideo estas el malnova legolibro de Vilho Setälä (Esperanta legolibro, Otava 1926, la tria eldono. Helsingforso!)

– Metu du spegulojn sur tablon paralele. Metu ovon inter la spegulojn kaj rigardu. Vi vidas kelkajn ovojn: samovaro, sam-ov-aro.

# Sukcesa FEJO-tendaro kun norvegoj

En la fino de aŭgusto okazis la plej atendita finnlanda esperantoaranĝo por la junularo – FEJO-tendaro. Ĉi-foje la ĉefa okazejo estis somerkabano en la vilaĝo Myrskylä (Ŝtormejo) en la urbo Loviisa. Meze de finna naturo kaj kamparo estis ĉarme ĝui la bonan kaj sunan veteron kaj trankvilan etoson. Internacian nuancon al la etoso donis niaj norvegaj gastoj, kiuj konsistigis duonon el la tuta 13-kapa partoprenantaro. Tio des pli instigis nin ekzerciĝi en la internacia lingvo.

La tagoj pleniĝis per kartoludoj, kvizoj kaj saŭnumado kun kolbasrostado kaj naĝetado en baseno. En la malheliĝinta vespero alvenis eĉ homlupoj, sed bonŝance ili hororis nur dum la ludo.

Pli urban amuziĝon donis nia ekskurso al Helsinki dum la lasta tago de la tendaro. Ni pasigis la tagon en la eksa fortikaĵo Suomenlinna kaj en la urbocentra regiono vidante kelkajn interesajn lokojn kaj eĉ la oficejon de EAF. Finfine estis tempo por hejmenvojaĝo, sed restas almenaŭ bonaj kaj varmaj memoroj. Espereble venontjara FEJO-tendaro iĝos simile internacia kaj bonetosa.

*Paula Niinikorpi*




***Junularo kvizas dum la tendaro.***

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Ilkka Santtila, Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki, s-posti *ilkka.santtila@welho.com*.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 www.esperanto.fi/helsinki jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 💻 onni.kauppinen@pp.inet.fi
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen) Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 040 867 2743 💻 www.esperanto.fi/jyvaskyla
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala. 💻 http://esperantooulu.info/ aini.esp@hotmail.com
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla 💻 matti.wallius@ebaana.net
- Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperanto-societo Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. 💻 www.esperanto.fi/tampere (pj. tapani.aarne@mbnet.fi ☎ 050 5245 823)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. 💻 tiina.oittinen@pp.inet.fi

- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. 💻 sylvia.h@kolumbus.fi ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. 📠 (09) 660 651 💻 steleto@pp.inet.fi
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 fejo@esperanto.fi. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 14 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 20 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 40 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on aktiivinen esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu säännöllisesti. Ryhmän yhteystiedot: (Martti Pennanen) Esperantoklubo de Lahti, Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. 💻 martti.pennanen@phnet.fi

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta. 💻 irja.miettinen@pp1.inet.fi, jormato35@gmail.com

Aktiivisia harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta.

## ESPERANTOLEHTI

**ilmestyy vuonna aperas dum la jaro 2011**

| Nro | Red.grupo komencas | Limdato | Aperas |
|---|---|---|---|
| 6 | 10.11. | 15.11. | en decembro |
| 1/2012 | 1.1. | 15.1. | en februaro |
| 2/2012 | 1.3. | 15.3. | en aprilo |

## Ilmoitushinnat ◆ Anoncprezoj

| Ulkopuoliset mainostajat / Ekster membraro: | Jäsenet / Membroj: |
|---|---|
| 1/1 sivu/paĝo 100 e | 1/1 sivu/paĝo 50 e |
| 1/2 sivua/paĝo 60 e | 1/2 sivua/paĝo 30 e |
| 1/4 sivua/paĝo 40 e | 1/4 sivua/paĝo 20 e |

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: *eafgazeto@esperanto.fi* aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

# Tradukoj de Leppäkoski

Mi trovis paperfolion, kun du versaĵoj en Esperanto. Estas malnova karbopapera kopio de tajpaĵo farita de Joh. Edv. Leppäkoski (1901–1984), kiun oni plej bone konas kiel la tradukinton de Kalevala. Post la morto de Leppäkoski, liaj heredantoj transdonis liajn esperantaĵojn al Esperanto-Asocio de Finnlando. Mi tiam iom ordigis la paperamason, kaj ĉi tiu kopio restis ĉe mi, dum la originalan maŝinskribaĵon mi transdonis al la arkivo de EAF.

Ambaŭ poemoj estas tradukoj el famaj finnaj aŭtoroj, kaj ambaŭ tekstoj estas ankaŭ komponitaj. Unu el ili estas tre populara kaj amata kanto:

La poemon Feliĉuloj de Aleksis Kivi komponis Oskar Merikanto. La alia, Kanto de najtingalo de V. A. Koskenniemi, ne estas same fama: ĝin muzikigis Hector, kiu ankaŭ aldonis plian tekston al la originalo. – La strofojn de Kivi mi intime konas pro tio, ke mi mem junaĝe esperantigis ilin, en formo neniam publikigita.

*Harri Laine*

Ambaŭ kantoj, kun bildoj de la iom flaviĝinta karba kopio: *www.ipernity.com/blog/harri/347065*

**Feliĉuloj**

*Feliĉuloj Heliĝas en nord' horizonto,*
*la sun' oriente sin levas,*
*foriĝas matena nebul',*
*dum vento el nordo blovas,*
*dum nokt' estas for'*
*dum brilas somera mateno*
*kaj sonas de birdoj kant'.*
*Sur pinton de alta monteto*
*en freŝa fruvento mi iras*
*kaj tie renkontas mi ŝin,*
*l' estrinon de mia koro,*
*dum nokt' estas for,*
*dum brilas somera mateno*
*kaj sonas de birdoj kant'.*

*Kun mia knabin' mi jen staras,*
*la buklojn zefiro flirtigas*
*kaj kvazaŭ flustrado de am'*
*eterna en valoj himnas,*
*dum nokt' estas for,*
*dum brilas somera mateno*
*kaj sonas de birdoj kant'.*

(La originalo havas kvin strofojn.)

## Seuraava numero ◆ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy joulukuussa. Jutut 15.11.2011 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en decembro. Artikoloj ĝis 15.11.2011 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <*eafgazeto@esperanto.fi*>.

**Kopio Niini, Tampere 2011**